En 14 el 20 lingvoj studitaj (inkluzive nun de la hebrea lingvo uzata en Izraelo), *biliono* estas 10^{12}. En 5 aliaj lingvoj (B, Fr, I, Pl, U) biliono estas 10^9, sed ofte *miliardo* estas sinonimo, kaj en unu el tiuj 5 lingvoj (F) la vorto biliono estas nekutima kaj miliardo estas la ordinara nomo de 10^9. En unu lingvo (Pt), *biliono* signifas 10^9 en laikulaj rondoj, sed 10^{12} en sciencaj rondoj.

Ĝenerale oni esprimis preferon por la sistemo *N*-iliono = 10^{6N} super la franca sistemo *N*-iliono = 10^{3N+3}, kvankam unu persono preferis uzi la nomon *N*-iliono por 10^{3N}. (En tia sistemo tri(i)liono = 10^9.)

En ĉiuj lingvoj escepte de la angla kaj usona, oni uzas komon inter entjeroj kaj decimalaj frakcioj. En plej multaj lingvoj, signoj (punktoj aŭ komoj) inter grupoj de 3 aŭ 6 ciferoj estas malmodernaj kaj estas forlasitaj komplete aŭ estas anstataŭitaj de spacoj. (Ekz. 1 000,1 aŭ 1000,1 estas mil kaj unu dekono.) Punkto tiam estas uzata nur kiel multiplika simbolo.

La skribaj malgrandliteroj estas sufiĉe similaj inter ĉiuj lingvoj kaj personoj. Kelkaj personoj ne klare distingis inter *a* kaj *o*, aŭ inter *h* kaj *k*, inter *n* kaj *u*, inter *r* kaj *z*, aŭ eĉ inter *r* kaj *v* aŭ inter *k* kaj *v*. Se ĉiu volus sekvi la formojn montritajn en la Fundamenta Ekzercaro por la malgrandliteroj, oni evitus tian konfuzon.

Pri skribaj grandliteroj, la afero estas diferenca. Kiel s-ro Padfield de Bath (Britujo) skribis al mi, eĉ diversaj eldonoj de la Fundamento ne interkonsentas pri ili. (Varsovia eldono kaj Pariza eldono.) Vidinte la diferencajn formojn proponitajn de miaj respondintoj por uzado en Esperanto, mi proponas ke oni evitu *ĉiujn* el ili kaj uzu presliterojn kiel grandliterojn. Eĉ tiam oni devas esti singarda. Oni skribu grandliteron *J* nepre kun ĝia vosto sub la linio, por eviti konfuzon kun skriba grandlitero *I* (vidu la Fundamenton), aŭ kun la angla aŭ usona skriba grandlitero *T*, kiu similas al skriba *I* de ĉiuj aliaj lingvoj. (Oni do uzu skribajn grandliterojn nur se ili estas preskaŭ identaj kun presliteroj; kaj tiam oni kontrolu mem ke ili ne similu al *alia* preslitero, kaj oni evitu ĉiujn ornamajn streketojn kaj bukletojn ĉe la komenco kaj la fino de la litero.)

Por eviti konfuzon inter skribaj 9 kaj *g* oni skribu 9 *sur* la linio, kaj la literon *g* kun ĝia vosto *sub* la linio. Ankaŭ oni ĉiam aldonu la suprenstrekon al la vosto de *g* (kiel en la Fundamento). Se oni ne devios de tiu regulo, tiam la vosto de la cifero 9 povas esti iom kurba sen danĝero de konfuziĝo kun *g*. La rekta vosto de 9 uzata de la angloj kaj usonanoj kaŭzas oftan konfuzon inter 9 kaj 4. Por eviti tion, ni skribu la ciferon 9 kun cirklo bone fermita ĉe la supro de la cifero, kaj 4 kun malfermita supro kaj kun horizontala streko pasanta *tra* la vertikalan strekon.

Por distingi inter 1 kaj 7, oni skribu 7 kun vosto daŭrigita sub la linion kaj kun la alia streko iom onda kaj tute horizontala kaj nepre ne dekstrensuprenira. Ni ne aldonu iun strekon supreniran al la cifero 1.

Mi dankas ĉiujn respondintojn pro ilia kontribuo al la sukceso de ĉi tiu enketo.

E591.13/6

PRI LA NOMADO DE GRANDAJ NOMBROJ *)

de J. GILTAY (Nederlando).

En la franca revuo *„La Nature"* de decembro 1948a Ch. Volet skribis pri „Ĉu vi scias denombri?" La temo estas sufiĉe grava por pravigi mallongan diskuton tie ĉi.

Ekzistas diferenco en la uzado de la vortoj biliono, triliono ktp. En Anglujo, Germanujo, Danujo, Nederlando kaj diversaj aliaj landoj, la nombroj miliono, biliono, triliono, k.t.p., formas geometrian progresion kun la proporcio miliono, en Francujo kaj Usono ankaŭ, sed kun la proporcio mil.

Akordo de ĉiuj landoj hodiaŭ ne ŝajnas ebla. Sed en la naŭa konferenco pri pezoj kaj mezuroj, en kiu Francujo estis bone reprezentita, estis rekomendata la unua sistemo.

Usono ne volas ŝanĝi sian sistemon.

Jen la tre mallongigita enhavo de la artikolo.

Ni supozas, ke en Esperanto ĝenerale estos uzataj la terminoj: miliono por 1000 000 (1000^2), miliardo por 1000^3, biliono por 1000^4, biliardo por 1000^5, k.t.p.; la homologaj termoj estu: mi-, bi-, tri-, kvari-, kvini-, sesi-, sepi-, oki-, naŭi-liono, respektive -liardo.

Ni rimarkas, ke la uzo de la decimala signo ankaŭ ne estas unuforma en la mondo. Usono kaj Anglujo ne uzas la komon, sed la punkton. Trioj da ciferoj tie estas apartigataj per la sama simbolo, por eviti konfuzon kun la decimala signo, nun lokita iom super la linio. En Eŭropo (escepte Anglujon) la decimala signo estas la komo; trioj da ciferoj estas apartigataj nur per interspacoj. Ni opinias ke nur la eŭropa sistemo ekskludas konfuzon inter la decimala signo kaj la punkto uzata kiel multiplika signo. Pro tio ni rekomendas la eŭropan sistemon por nia revuo kaj ĝenerale por Esperanto.

E591.15

511.11

ĈU „BILION" KAJ „TRILION" ESTAS INTERNACIAJ RADIKOJ? *)

de F. J. BELINFANTE (Usono).

Mi tute konsentas kun la propono de samideano Giltay pri „miliardo" kaj pri la nomoj „kvariliono", „kviniliono", „sesiliono", ktp., kaj simile „kvariliardo", „kviniliardo", ktp. Mi certe hezitus enkonduki *tiom* da ne-tre-necesaj novaj vortoj, se ili estus apartaj novaj radikoj; sed sufiĉas enkonduki nur du sufiksojn -ilion- kaj -iliard- kun la signifoj „miliono je la potenco ....." kaj „miloble miliono je potenco .....".[1]) Tiam *aŭtomate* estus permeseblaj

*) Ĉi tiuj artikoloj jam de du jaroj atendas publikigon. Ni ĝisatendis la rezulton de la enketo.

[1]) Tian proponon mi jam faris en Bulteno de I.S.A.E., n-roj 41 kaj 44 (januaro kaj oktobro 1936). Ankaŭ atentu interesan proponon de C. Vandevelde, en n-roj 42 kaj 46 (aprilo 1936 kaj marto 1937). Li proponis prononci *m*. 1000^n kiel *m* foj *n*-il; do „duil" = miliono, „triil" = miliardo, „kvarilono" = duilionono, ktp. Elekto inter ĉi tiu du sistemoj de Vandevelde kaj de mi mem ŝajnas esti tasko de la Akademio de Esperanto; tamen voĉdonado pri ili jam nun inter ĉiuj legantoj de Scienca Revuo povus esti interesa.